

Respondo de István Szerdahelyi al la dana lingvisto Henning Spang-Hannsen,
la 8-a kajero de la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 718, 1977.07.13 & 15 & 16

Parolas Claude Gacond. En la tria numero de la dua jarkolekto de lingvistika periodaĵo dana aperis en 1975 artikolo de la konata dana lingvisto Henning Spang-Hannsen. Titolo esperantigita: 'Ĉu la internacia helplingvo estas lingvo?'. En tiu ĉi artikolo la dana lingvisto konkludis, ke Esperanto ne estas vera lingvo.

En ampleksa respondo profesoro István Szerdahelyi demonstras, ke Esperanto estas vera lingvo. Estas tiu ĉi respondo, kiun publikigas Kultura Centro Esperantista kiel 8-an kajeron de sia kolekto Studoj. En sia enkonduko sinjoro Tazio Carlevaro skribas: «Ni proponas tiun eseon al la publiko, ĉar ĝi estas malofta ekzemplo de trankvila sed scienceca faktoriĉa polemikaro en la interlingvistika kampo.»

Ni aldonu, ke ĝi estas bela ekzemplo de internacia konversacio. Respondas al dana lingvisto hungara kolego tra la kanalo de svisa eldonejo. Tiu ĉi fakto eble plifortigos la demonstron, ke Esperanto estas vera lingvo ĉe la okuloj de la lingvisto Henning Spang-Hannsen, se tabuaj konsideroj ne malhelpos lin rigardi al la realaj faktoj.

La respondon de d-ro István Szerdahelyi, instruanto de Esperanto kaj interlingvistiko de la budapeŝta Teknika Universitato Eötvös Loránd, estas ege interesa dokumento por tiuj, kiujn interesas la planlingva disvolviĝo kaj esperanto mem.

Tiun densan respondon 40-paĝan ni ne povas resumi en kelkminuta recenzo. Tial ni lasas al ĉiu interesato la plezuron mem sekvi la argumentadon de la aŭtoro tra ĉapitroj ege variaj. Historiemuloj trovos multajn utilajn sciigojn, same lingvo-analizemuloj. Kaj fine de la broŝuro tre detala bibliografio favoras la memserĉadon.

Unu el la kernoj de la verko estas tre detala demonstro helpe de la diversaj signifoj de la sufikso '-ejo', kiun nur la supraĵa kono de Esperanto igas lingvistojn aserti, ke esperanto estas monotone unuforma, tro regula. Ni opinias, ke tiu ĉi ĉapitro estas en si mem tiel interesa por esperantistoj, ke la venontan semajnon ni citados el ĝi plurajn erojn. Tiuj citaĵoj helpas niajn geaŭdantojn pli bone kompreni, kiel funkcias la vortfarado en esperanto.

Fine de sia respondo doktoro Istvan Szerdahelyi citas atentigon de la lingvisto Migliorini, kiu diris, okaze de la dua Internacia Kongreso de Lingvistoj okazinta en Ĝenevo en 1931:

«Oni devas kompari la vivkondiĉojn de iu internacia lingvo ne al tiu de naciaj lingvoj en ilia nacia uzado, sed al tiu de naciaj lingvoj en ilia internacia uzado. Tio forigas la danĝeron de iu diverĝa evoluado.»

Ĝuste tion ĉi ne nur multaj lingvistoj, sed ankaŭ la plimulto de la esperantistoj, ne komprenis. Kaj tiurilate ni citos doktoron Szerdahelyi mem: «Estas pli ol eraro kaj perfekta miskompreno studi la problemon de la internacia lingvo laŭ la kategorioj de iu nacia lingvo, funkcianta interne de siaj lingvo-limoj etnaj. Estas tute alia tasko studi, ekzemple, la funkciadon de la angla lingvo interne de sia etna medio, denove alia studi ĝian statuson en la anglaj ekskolonioj, kaj denove alia studi la statuson de anglalingvo kiel internacia helplingvo.»

Kaj d-ro Szerdahelyi daŭrigas dirante: «Se oni serĉas historian ekzemplon, oni eble povus kompari la nunan, modernan funkciadon de Esperanto kun la funkciado de mez-latino en

tiutempe Eŭropo. La latina jam ne plu havis etnan medion, ankaŭ la lingvo forte ŝanĝiĝis, kaj ĝi plenumis la rolon de neŭtrala interlingvo en la tuta Eŭropo.»

D-ro Szerdahelyi donas multajn ekzemplojn koncerne la rolon de danaj verkistoj skribintaj en la mez-latina inter la jaroj 1140 kaj 1740. Ĉiuj ĉi ekzemploj demonstros, ke internacia helplingvo, kiel tiam la mez-latina, povas plenumi ĉiujn funkciojn de la lingvo. Ni tre esperas, ke en alia eseo d-ro István Szerdahelyi pli detale pritraktos tiun ĉi interesan kaj nekonatan temon, kiun la esperantistoj devus multe pli bone koni.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012